
Internacia Esperanto- Arkivo

Konciza jarraporto IEA 2022

Raportas: Marc Vanden Bempt

La jaro 2022 estis la unua plena laborjaro de la Internacia Esperanto-Arkivo IEA, oficiale fondita en la 25-a de januaro 2021.

Fine de 2022 la kolekto konsistis el

- 7.897 plenaj revujaroj (de 998 titoloj)
- (almenaŭ) 5.046 neplenaj revujaroj (de aldonaj 446 titoloj)
- miloj da duoblaj revunumeroj (ne ekzakte nombrata) el 5.293 revujaroj
- 14.455 libroj, broŝuroj kaj (el tiu sumo) 551 dokumentaroj.
- da ili 11.606 duoblaĵoj (de 5.149 malsamaj titoloj) por vendo kaj interŝanĝo.
- Atendas (2023) ordigado de centoj da dosieroj kaj diversaj aliaj objektoj kaj dokumentoj.

La integriĝo de la kolekto el Kortrijk estas preskaŭ preta, finfarota en januaro 2023.

La kvalito de la kolekto plialtiĝas kaj daŭre estas plialtigita: senacidaj skatoloj, forigitaj plastaĵoj kaj vinktoj, k.s.

Pluraj eldonantoj nun sendadas sian revuon senpage al IEA.

Ni transprenis por konservado kolekton de Myriam Waterynckx (Aalst) kaj ricevis erojn el pluraj aliaj fontoj ankaŭ, el Belgio kaj el eksterlando.

Duoblaĵoj estas proponataj por vendado. Ni nun proponas 5.150 libro-titolojn kaj pli ol 1.000 binditajn revuokolektojn, je tre favora prezo.

La kolekto restas en Belgio, provizore daŭre en privata domo. Esplorado kaj decido pri definitiva ejo restas unu el la gravaj agadpunktoj. En 2023 ni aktive priesploros la eblecojn.

Bedaŭrinde, antaŭ ol kontakti IEA'n tra FEL, el la kolekto de Myriam Waterynckx jam forĵetiĝis granda stako da leteroj, raportoj k.s., tiel ke perdiĝis grava arkivo. Tio okazos ankoraŭ, ĉu ni povas tion eviti? Oni sciu ke IEA povos grave roli por tion eviti.

Tra la jaro la kolekto de IEA estis uzata por diversaj esploroj. La detala raporto, kiun ni sendas al ĉiuj Amikoj de IEA, enhavas konkretajn ekzemplojn de tio.

Finance subtenas al IEA la Amikoj kaj Mecenatoj (ekzemple la eksa grupo de Tienen, kiu donacis sumon de pli ol 1.700€). Ni esperas ke estonte ĉiam pli da homoj konsciu ke gravas al IEA kaj Esperantujo ĝenerale tiel subteni ties agadon.

Eblas subteni la konservadon de la Esperanto-heredaĵo, per IEA:

Amiko - Briko - Mecenato - Investanto
- Volontulo - Aĉetanto

Detalajn informojn kaj anoncilon vi trovos en la retejo

iespa.eu